**La mikrofiziko de la sambo laŭ**
**Daniel Ansor**
**(Daniel Ansor kaj Filipe Paiva)**

Memorebla dometo scena,
farbita karmine, serena,
de miksrasa gento plena.
Pandero, kavakinjo, gitaro.
Sufiĉu.

Lokita en strato modesta,
odoranta kiel serenado festa,
alpruntante dum tuta semajno
je la ĝojeco.
Amo.

Kvartalo de gento ama,
en ĉiu placo jen rondo samba,
ĉiu rondo estas ... kiel ...
nedirebla, bonega por vidi kaj aŭdi.
Varmo.

En urbo tiel bela
kiel Mangejra kaj Portela,
en la ponto defila aŭ dispela.
Belega!

Ĝi estas nomata en la mondo pro tio
mirinda kaj benita de Dio.
Ineco, jen ĝia plej granda riĉeco.
Kiel klarigi ...
Plena lukso.

Luksas vivi en ĉi Rio.
Luksas baniĝi en ĉi maro.
Luksas vidi "É do Pandejro"
defilante en karnavalaro.

Estas lukso ĉi tiu dometo,
ĉi strato.
Estas lukso ĉi tiu kvartalo,
ĉi grundo.

Tiel laŭ mi, naskiĝas la sambo
kanzona, sambbalanca,
funka, sambintriga.

Mi scias pli multe, tamen ne diras.
Sekretu.